

Renkontiĝo inter japanaj kaj ĉinaj esperantistoj
laŭ la revuo *L'Omnibuso*, julio/aŭgusto 1974
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 579 1974.11.13 & 16

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La esperantistaj japanoj ofte plendas pri sia izoliteco. Por partopreni eksterlandajn esperanto-renkontiĝojn ili devas veturi ĝis Ameriko, Oceanio aŭ Eŭropo. Ĝis nun Popola Ĉinio restis al ili hermete fermita. Sed pro invito de Ĉina Esperanto-Ligo povis disvolviĝi en aprilo de tiu ĉi jaro unua renkontiĝo en Ĉinio mem inter ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj. Esperanto povas vere disvolviĝi, nur se ties parolantoj povas regule renkontiĝi en internaciaj aranĝoj.

A.- Sinjoro Muramacu Jukijosi interese raportas pri tiu renkontiĝo inter japanaj kaj ĉinaj esperantistoj en la revuo *L'Omnibuso*, julio-aŭgusto 1974. Jen ni resume citas lin :

Cl.- « *En [...] aprilo [1974] dum du semajnoj ok membroj de Japana Esperanto-Delegacio vizitis Ĉinion pro la invito de Ĉina Esperanto-Ligo. La 16-an de aprilo posttagmeze nin atendis du esperantistoj ĉe la stacidomo Kantono, Ĉinio. Unu el ili estis s-ro Ĉen Juan, ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo, kiu vizitis Japanion en la lasta jaro okaze de la 60-a kongreso de la japanaj esperantistoj. [...] Li scipovas ne nur esperanton sed ankaŭ la anglan, francan kaj germanan lingvojn kaj iam studis arkitekturon kaj nun laboras kiel ĉefo de eldona buroo por biletoj.*

A.- *La alia persono estis s-ino Tan Hiuĝu, naskita en la jaro 1941. Ŝi iam studis la rusan lingvon, sed pro la ŝanĝiĝo de la politika situacio oni ĉesigis al ŝi la studadon kaj tial por ŝtopi la vakuon ŝi komencis lerni esperanton verŝajne pro la instigoj de iuj eminentaj esperantistoj. Nun ŝi laboras en la redakcio de 'El Popola Ĉinio'. Kvankam ŝi aspektas modesta kaj sindetenema, tamen vere mi miris, kiam ŝi komencis paroli kun ni en esperanto tiel bone, vikle kaj energie kiel veterana esperantistino, kiun oni ofte trovas en la kongresoj.*

Cl.- *Ĉe Kantono kune kun ili ni prenis aviadilon. [...] kaj [la] saman vesperon [...] ni atingis la flughavenon de Pekino, kie atendis proksimume dek esperantistoj por bonvenigi nin. Inter ili troviĝis s-ro Je Laiŝi, vicprezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, kaj s-ro Ĝu Mingi, kiu laboras en esperanta sekcio de la Fremdlingva Eldonejo. [...]*

A.- *En la sekvanta tago antaŭtagmeze ni ekskursis al Somera Palaco en Pekino kun s-ro Ĉen Juan kaj s-ino Tan Hiuĝu. Sidante en ripoz-ĉambro mi aŭdis de s-ro Ĉen Juan pri Kadra Lernejo, kie li estis dum tri jaroj. La vorto Kadra Lernejo estis por mi ne tuj facile komprenebla, sed poste ni havis okazon viziti ĝin kaj mi konstatis, ke ĝi estas vere unika sistemo. [...] Duontage [la gelernantoj] lernas la socialisman teorion en ĉambro kaj duontage sur la kampo laboras fosante sulkon aŭ verŝante la naturan sterkon. [...] Multaj [...] eminentaj esperantistoj estis kaj estas en tiuj lernejoj, sekve oni ne povis prizorgi la esperanto-movadon en Ĉinio. [...] Tamen la gazeto 'El Popola Ĉinio' seninterrompe eldoniĝis ĉiumonate kaj la esperanta programo da Radio-Pekino disendiĝis en ĉiu sabato kaj dimanĉo. Tio signifas, ke en Ĉinio la esperanto-movado ne estingiĝis, sed dum iom da tempo ripozis.*

Cl.- *Posttagmeze sur la lageto Kunming en la Somera Palaco ni havis surŝipan kunvenon aranĝitan de Pekinaj samideanoj. En ĝi ĉeestis ĉirkaŭ 20 samideanoj. [...] Dum la kunveno*

ni kantis, babilis kaj pasigis agrablan tempon en gaja atmosfero. [...] Krom kelkaj eminentuloj preskaŭ ĉiuj por la unua fojo parolis en esperanto kun eksterlandaj samideanoj. Malgraŭ tio ju pli pasis la tempo, des pli glate funkciis iliaj langoj.

A.- Vespere ĉe Pikino-Hotelo ni havis oficialan bankedon aranĝitan de Ĉina Esperanto-Ligo. [...]

Cl.- La 18-an de aprilo ni vizitis instituton de minoritataj nacioj kaj tie renkontis unu maljunan esperantiston, profesoron Yu Dawchyuan, kiu studis budisman filozofio de Tibeto. [...]

A.- Posttagmeze ni havis oficialan kunvenon de esperanto, kaj inter multaj eminentuloj mi vidis s-ron Ven Lofon, kiu estas konata kiel tradukinto de 'Noveloj de Lusin' kaj elstara vortaristo. Kvankam li estas 73-jara, tamen li ankoraŭ tre vigle dediĉas sin al esperanto kaj kun granda espero li rigardas belan estontecon de nia movado en Ĉinio. Li konfesis al mi, ke antaŭ la liberiĝo, tio estas antaŭ 25 jaroj, pro la duonkolonia stato de Ĉinio li estis ege malĝoja, senespera, preskaŭ pesimisma, sed nun la situacio tute ŝanĝiĝis kaj dank'al la progreso de la nova Ĉinio li estas kontenta kaj havas feliĉan tempon kiel eminenta esperantisto. Li asertis, ke plej baldaŭ oni eldonos novan vortaron Esperanto-Ĉina. [...] En tiu kunveno ni ricevis la duan eldonon de la 'Noveloj de Lusin', kiu aperis nur antaŭ kelkaj tagoj.

Cl.- En sia konkludo sinjoro Muramacu diras :

A.- Mi aŭdis kaj spertis multajn aferojn en Ĉinio, sed nun mi ne povas ĉion skribi. Ĉar mi estas tute ne certa, ĝis kioma grado mi rajtas priskribi. [...]

Cl.- Ni esperas, ke similaj renkontiĝoj, kiuj permesas rektajn kontaktojn inter ĉinaj kaj alinaciaj esperantistoj, multiĝos dum la venontaj jaroj. Tiuj personaj rilatoj improvizataj dum kunvenoj estas fine la fundamento de nia komuna laboro.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !